

Heinrich Heine, Die Lorelei	Heinrich Heine, Lorelej'	Heinrich Heine, [Ne scias mi, kio okazis]	Heinrich Heine, The Lorelei	Heinrich Heine, Lorelej	Heinrich Heine, Lorelay
	<i>tradukita de Leopold Elb</i>	<i>tradukita de Paul Gottfried Christaller</i>	<i>tradukita de L. W. Garnham</i>	<i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>	<i>tradukita de Hans-Georg Kaiser</i>
	<i>Tiu traduko estas poste iom modifita de alioj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.</i>	<i>El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".</i>			
Ich weiß nicht, was soll es bedeuten, daß ich so traurig bin; ein Märchen aus alten Zeiten, das kommt mir nicht aus dem Sinn.	Ne scias mi, kial mi estas Malgaja en la kor'. Antikva fabelo restas Por ĉiam en mia memor'.	Ne scias mi, kio okazis al mia tristema kor': Antikva legendo min kaptis, ne cedas el mia memor'.	I do not know what it signifies. That I am so sorrowful? A fable of old Times so terrifies, Leaves my heart so thoughtful.	Ne scias mi, kial subita malgaj' en la koro naskiĝis; el tempo jam enterigita legendo al mi reviviĝis.	Min kaptas malgaj' en la koro, pro kio tia trist'? Fabel' el antikva foro ne lasas de mi kunpersist'.
Die Luft ist kühl und es dunkelt, und ruhig fließt der Rhein; der Gipfel des Berges funkelt im Abendsonnenschein.	Vespero jam ekmalheliĝas, Fluadas la Rejn' en trankvil', La supro de l' monto lumiĝas En vespersuna bril'.	La Rejno fluadas trankvile murmuras kiel mister', la supron ŝtonegan orumas sunbriloj de la vesper'.	The air is cool and it darkens, And calmly flows the Rhine; The summit of the mountain hearkens In evening sunshine line.	Jam malvarmetiĝas l' aero, la Rejno mallaŭte babilas, per oro de l'sun' en vespero la supro de l' monto rebrilas.	Aere fridetas, trankvilas, malhelas jam la Rejn'. La monto surpinte brilas vespere en rava scen'.
...	...	...	...	...	...

Die schönste Jungfrau sit- zet dort oben wunderbar, ihr goldnes Geschmeide blitzet, sie kämmt ihr goldenes Haar.	Belega knabino jen tronas Kun ora juvelar', La belan vizaĝon kro- nas Mirinde la ora harar'.	Plej bela virgino jen sidas mirinda sur la mon- tet' kaj ŝia oraĵo radias, <sup>4</sup> ŝi logas kiel magnet'.	The most beautiful Maiden entrances Above wonderfully there, Her beautiful golden attire glances, She combs her golden hair.	Plej belan knabinon mi vidas: en ora ornamo brilan- te, sur supro de l' monto ŝi sidas, la harojn mistere kombante.	Tre ĉarma feino sidas, jen supre por ador'; la ora ornamo ridas; ŝi kombas harojn el or'.
Sie kämmt es mit golde- nem Kamme, und singt ein Lied dabei; das hat eine wundersame, gewaltige Melodei.	Ŝi uzas kombilon el oro Kaj dume kantas ŝi. Mirige tuŝas al koro Sorĉiga la melodi'.	Ŝi kombas la oran ha- raron abundan per ora kom- bil', kantante misteran li- don, <sup>5</sup> ravantan kiel sunbril'.	With golden comb so lu- strous, And thereby a song sings, It has a tone so wondrous, That powerful melody rings.	La oran kombilon ŝi movas kaj kantas tra l' pura aero, kaj forto mirinda sin trovas en tiu ĉi kant' de l'vespero.	Ŝi kombas per ora kombilo kaj kantas kun pasi'; mirigas min la elbrilo kaj forto de l' melodi'.
Den Schiffer im kleinen Schiffe ergreift es mit wildem Weh; er schaut nicht die Felsen- riffe, er schaut nur hinauf in die Höh.	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia ve- tur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipisto en sia ŝipeto kaptiĝas per stranga dolor', la rifon li tute ignoras. atentas nur ŝin kun fervor'.	The shipper in the little ship It effects with woe sad might; He does not see the rocky slip, He only regards dreaded height.	Ŝipet' iras sur la rive- ro, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kan- tanto.	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ek- zalt'. Li ja la rifojn ne vi- das', li vidas nur supren sen halt'.
...	...	...	...	...	...

<sup>4</sup>En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

<sup>5</sup>En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Ich glaube, die Wellen ver- schlingen am Ende Schiffer und Kahn; und das hat mit ihrem Sin- gen die Lorelei getan.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Mi kredas: la ondoj englutas <sup>6</sup> ŝipiston, ŝipeton je l' fin', kaj kulpa pri tio nur estas kantado de la virin'.	I believe the turbulent wa- ves Swallow the last shipper and boat; She with her singing craves All to visit her magic moat.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvo- turnado; ĝin Lorelej' faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.	Mi kredas, ke ondoj ti- ras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eli- ras de Lorelaj-siren'.
...	...	...	...	...	...

---

<sup>6</sup>Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr", Abschnitt II. Siehe auch ein [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/unter:http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb_found). Vidu ankaŭ: [http://www.gedichte.vu/?die\\_lorelei.html](http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html). La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon [http://www.lieder-archiv.de/die\\_lorelei-notenblatt\\_300493.html](http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html).

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 – †1950-12-31).

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo <http://de.wikipedia.org>.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

L.W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)